

ESZPERANTÓ B2 MINTAFELADATSOR

Olvasáskészség 1

Maximális pontszám: 20

Olvassa el figyelmesen az alábbi szöveget, majd annak alapján válaszoljon magyarul a kérdésekre!

La ĉeesto de virinoj sur pirata ŝipo estis plej severe malpermesita. Tamen la historio konas kelkajn piratinojn. Anne Boney estis eksterleĝa filino de irlanda advokato, kiu translokiĝis al Nordameriko, kie li sukcese laboris. Sed lia filino havis nekutiman edukon: jam ekde ŝia unua vivojaro la patro vestis ŝin per viraj vestoj kaj Anne pasigis sian infanaĝon kun knaboj. Ŝi kondukis kiel knabo kaj eĉ estis la plej kuraĝa kaj forta inter ili.

Anne konatiĝis kun la fama pirato Calico Jack en la insulo New Providence, kiu estis tiam konata kiel pirata nesto. Vestita kiel viro, Anne foriris de tie kune kun Jack al Jamajko*, insulo sub angla regado. Tie ili aliĝis al pirata ŝipo, kiu prepariĝis prirabi hispanajn ŝipojn. Baldaŭ post tio Calico Jack organizis ribelon kaj ekkomendis la ŝipon.

Sur tiu sama ŝipo troviĝis alia piratino, Mary Read. Ankaŭ Mary estis neleĝa filino. Kredante, ke tiel ŝia infano havos pli facilan vivon, la patrino prezentadis la knabinon kiel knabon. Kiam Mary iom kreskis, la patrino tuj laborigis ŝin sur ŝipo. Baldaŭ Mary fariĝis soldato, partoprenis batalojn kaj neniu dubis pri ŝia vireco. Dum la soldatado ŝi pli intimiĝis al unu amiko kaj malkovris al li, ke ŝi estas virino. Je granda ĝojo de la tuta regimento ili geedziĝis, sed post tio ŝi devis forlasi la ŝipon. Ŝi malfermis restoracion, kiu bone funkciis, ĝis la morto de ŝia edzo. Tiam ŝi denove vestis sin per vira vestaĵo kaj enŝipiĝis en la sama ŝipo, kie iam ŝi ekkonis Jack kaj Anne. Tiel okazis, ke eĉ du virinoj estis sur unu pirata ŝipo.

Mary denove enamiĝis kaj tuj decidis, ke ŝi kaj ŝia nova amato revenu al trankvila vivo. Dum ili atendis okazon forlasi piratadon, la fianĉo de Mary kverelis kun maristo kaj defiis lin. Timante perdi sian estontan edzon, Mary decidis pli forte ofendi la mariston, ke li unue kun ŝi batalu. Kiam la fianĉo de Mary venis por la duelo, lia rivalo jam estis mortinta.

Mary tamen ne sukcesis realigi sian revon. Calico Jack kaj Anne dezirante ekhavi pli multe da valoraĵo komencis ataki ĉiun ŝipon, kiun ili renkontis, eĉ la komercajn ŝipojn de Jamajko*. En 1721 la insulestro decidis ĉesigi tion. La atako venis neatendite, kiam preskaŭ ĉiuj piratoj estis ebriaj. Calico Jack kaj lia ŝipanaro estis kaptitaj. Forte defendis sin nur du piratoj – ili estis Anne kaj Mary.

Kondamninte la tutan ŝipanaron al morto la juĝisto demandis la kaptitojn, ĉu ekzistas iu kaŭzo kontraŭ la plenumo de la puno. Ambaŭ virinoj asertis, ke ili estas gravedaj, kion kuracisto konfirmis kaj la mortopuno estis anstataŭigita per malliberigo. Anne naskis infanon kaj jaron poste ŝi jam estis libera. Oni diris, ke amikoj de ŝia patro liberigis ŝin kaj transportis ŝin hejmen. Pri ŝi nenion oni plu aŭdis. Mary Read ne vidis sian infanon. en la malliberejo ŝi malsaniĝis kaj mortis.

**Jamajko – Jamaika*

- | | |
|--|--------|
| 1. Mit tudunk meg Anne Boney gyermekkoráról? | 4 pont |
| 2. Hogyan lett Calico Jack kalózzvezér? | 3 pont |
| 3. Milyen mesterségeket űzött Mary Read? | 3 pont |
| 4. Miért sértette meg Mary az egyik matrózt? | 3 pont |
| 5. Miért fogták el Calico Jack legénységét? | 4 pont |
| 6. Mi lett Anne további sorsa? | 3 pont |

II. Íráskészség

Íráskészség 1

Maximális pontszám: 20

Írja le gondolatait idegen nyelven az egyik témáról úgy, hogy minden irányítási szempontra térjen ki! (Az irányítási szempontok sorrendjét nem kell betartania.) Fontos, hogy összefüggő szöveget hozzon létre. Tartsa be a **levél** / **email** formai jellemzőit! (Dátum, megszólítás, üdvözlő forma, aláírás.)

Terjedelem: 17-20 sor

A./ Képzelve el, hogy nemrég, egy kirándulás alkalmával, kisebb balesetet szenvedett. Az a nap nagyon nehéz volt az Ön számára, de szerencsére nem történt nagy baj. Számoljon be a történetéről levélben / e-mailben külföldi barátjának, az alábbi szempontok szerint:

- Megírja, mikor és hol történt az eset;
- Elmeséli, mi történt pontosan, és hogyan;
- Beszámol arról, hogyan próbálták megoldani a helyzetet;
- Felidézi, hogyan élte meg akkor mindezt, és mi volt a legnehezebb benne;
- Közli, hogyan végződött az eset.

vagy:

B./ Nemrég vett részt egy osztálytalálkozón, ahol jelen volt hajdani kedvenc tanára is. Ennek kapcsán írjon levelet / e-mailt külföldi barátjának, az alábbiak szerint:

- Megírja, milyen alkalomból találkozott kedvenc tanárával, és milyennek találta őt ennyi idő után;
- Magyarázza el, miért szerették őt;
- Elevenítsen fel egy meghatározó élményt vele kapcsolatban;
- Mit gondol a tanári pálya előnyeiről és hátrányairól saját emlékei alapján;
- Fejtse ki, mi hiányzik leginkább az iskolákból, és mi lenne a megoldás.

Íráskészség 2

Maximális pontszám: 10

Terjedelem: 10-12 sor

Egy internetes fórumon az alábbi kérdés merült fel. 10-12 sorban adjon tanácsot, fejtse ki véleményét indoklással együtt az említett jelenséggel kapcsolatban!

Mia kolego invitis min al la geedziğa festo de sia filo. Mi ne konas la hungarajn kutimojn. Kiel mi vestiĝu, kion mi donacu al la juna paro? Ĉu vi povas doni al mi konsilon?

III. Közvetítés

Közvetítés

Maximális pontszám: 15

En la jaro 2005 esperantistoj festis la 100 jariĝon de internaciaj Esperanto-kunvenoj. Unue en marto 2005 okazis la renkontiĝo "Boulogne 2005", en la franca urbo Bulonjo, kie la kreinto de Esperanto, Zamenhof partoprenis la unuan internacian Esperanto-kongreson kun 700 partoprenantoj. Post cent jaroj, estis ripetita lia parolado en la sama teatro kiel tiam.

Citaĵo el la parolado de Zamenhof:

„En malproksimaj tempoj la homa familio disiĝis kaj ĝiaj membroj ne plu komprenis unu la alian. El fratoj fariĝis malamikaj grupoj, kaj eterna milito komenciĝis inter ili. Nun en la malgrandan urbon de la franca mar-bordo kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj, kaj ili renkontiĝas ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu la alian. Ni konsciu la gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.”

